Laŭzana Esperanto-Societo
Septembro 2021 - n-ro 7

# Laŭzana informilo

## Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 4an de oktobro *Karlota prelegos*
- Lu, la 1an de novembro *David prelegos*
- Sa, la 18an de decembro *Zamenhofa Festo*
- Lu, la 10an de januaro *Decidota*

*Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe :* ***eventaservo.org/o/LES***

**Lunde, la 6an de septembro 2021 je la 20a**

**ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier en Montreux**

**Venu kun viaj demandoj kaj lingvaj problemoj, ni provos solvi ilin.**



Ekskurso 2021 – 12an de junio - Vizito de la *Orgena Muzeo* en Roche – Melody koncertas.


## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


**Komitato 2020**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)



En malsanulejo sonoras la telefono:
*« Saluton.»*
*« Bonan tagon. Ĉu estas la akceptejo? Mi deziras novaĵojn pri la sano de paciento.*
*« Kiel li nomiĝas?»*
*« Estas S-ro Johano, ĉambro 302.»*
*« Momenteton, mi petas, mi transiras al la flegistino.»*
Post longa atendo:
*« Saluton. Mi estas Anĝela, la flegistino de la tria etaĝo. Kion mi povas fari por vi?»*
*« Mi deziras koni la sanan staton de S-ro Johano, ĉambro 302.»*
*« Momenteton. Mi provos trovi la deĵorantan kuraciston.»*
Post tre longa atendo:
*« Ĉi-tie estas la deĵoranta kuracisto, mi aŭskultas vin.»*
*« Bonan tagon, Doktoro, mi deziras koni la sanan staton de S-ro Johano, kiu ĉeestas ekde tri semajnoj en la ĉambro 302.»*
*« Momenteton, mi konsultas lian dosieron.»*
Post ankoraŭ tre longa atendado:
*« Huuuummm … jen. Hodiaŭ, li tre bone manĝis, lia arteria premo kaj lia pulso stabilas, li perfekte bone reagas al la medikamentoj. Normale, morgaŭ ni forigos la kardian monitoron. Se ĉio daŭras kaj tiel bonegas ankoraŭ 48 horojn, lia persona kuracisto plenumos la elirajn paperojn por la fino de la semajno.»*
*« Aaahhh ! Estas mirindaj novaĵoj. Mi tre ĝojegas. Dankon.»*
*« Laŭ kiel vi parolas, mi supozas, ke vi tre proksimas al li, certe familiano?*
*« Ne Doktoro. Mi estas s-ro Johano kaj mi vokas vin el la ĉambro 302. Ĉiuj eniras, eliras mian ĉambron kaj neniu diras ion al mi. Mi ĵus volis scii. kiel mi fartas. Multajn dankojn.»*

Rakonto en 5 historioj verkitaj de 13 el niaj membroj.

# LA FANTOMOJ DE LA LAGO

*versio B, parto 3*


Kaj ĉiuj silentas. Oni povus aŭdi muŝon flugi. La restoraciestro alvenas veranden dirante al la maltrankvilaj klientoj: *«Ne timu. Tio okazas kelkfoje kaj tio tute ne gravas.»* Sed la homoj ne trankviliĝas, ĉar la vento blovegas pli kaj pli. Multnombraj anoncas: *«Ni foriru rapide antaŭ la pluvego.»* La salono komplete malpleniĝas kaj nur restas ene Maksimo, Julia kaj mi. Ni ne plu scias, kion diri. En peza silento la restoraciestro alportas kandelojn surtablen. Ĉi-minute la poŝtelefono de Maksimo sonoras kaj ĉiu el ni tuj eksaltas. Li momentete hezitas kaj respondas malaŭte: *«Jes?»* La laŭtparolilo aŭdigas viran voĉon: *«Saluton Maksimo. Ĉu vi scias, kiu mi estas?» Neniu rekonas la parolanton.* «Vere, ĉu vi ne rekonas min?» La silento tre … tre pezas.

La voĉo estas malakuta sed laŭta. Ĝi ne estas niaregiona voĉo, eĉ eksterlanda akĉento. Maksimo ŝajnas rekoni la voĉon sed ne plu scias, al kiu ĝi apartenas. *«Mi nomiĝas Arturo, ĉu vi ne plu rememoras pri mi? Mi estas amiko de Ernesto kaj ni ambaŭ konatiĝis, kiam mi venis ĉe li en Kanado antaŭ kvar jaroj. Ni tri, kun via fratino, iris al la koncerto de la Gaŭĉoj Pimpaj. Ĉu nun vi rememoras?»* Tuj Maksimo respondas: *«Ho jes, pardonu … sed kiel vi scias, ke mi ĉeestas en Svislando?» « Via fratino telefonis al mi dirante, ke vi enketas pri la dramo. Ŝi proponis al mi kontakti kaj helpi vin por viaj serĉoj. Kiam la dramo okazis, Ernesto loĝis miahejme. Lia malapero dolorigis min multe. Li kaj mi ĵus partoprenis la Ĵazan Festivalon kaj li malaperis samvespere.»*

*«Venu kafumi miahejmen morgaŭ je la 14-a»*, proponas Arturo. Maksimo petas nian konsenton kaj respondas al Arturo: *«Plezure. Ni triope venos.  Ĝis baldaŭ.»*

La morgaŭon ni ricevas perSMSe la adreson de Arturo, kiu ne foras de la restoracio. Nia gasto ofertas al ni trinkaĵojn kaj komencas diri: *«Mi pensas, ke Ernesto ne malaperis akcidente.»* Ĉiuj, ni silente aŭskultas atenteme. *«Ernesto ĉeestis svislande por aĉeti, kun sia partnero Dieter, la restoracion, kiun ili nomas* “Ĉe La Du Amikoj”. *La kunuloj multekoste pagis ĝin al la eksposedantoj ĉikanajn. Ĉe tiu drama vespero Ernesto diris al Dieter: «Zorgu pri nia klientaro, ĉar mi rendevuas kun la gevendintoj.» Ni neniam plu revidis lin. Dieter ne sciis, kio enboate okazis sur la lago sed certas, ke oni provis mortigi Erneston.»*

*« Kial vi diras … oni provis … ?»* demandas Maksimo. Arturo respondas: *«Mi konservas la kontakton kun Dieter; li tre bone estras la restoracion post la malapero de Ernesto. Ekde la komenco li dubas pri la morto de sia partnero kaj certas, ke li ankoraŭ vivas. Ĉiam, kiam li iom libertempas, li serĉas la malaperulon vizitante ĉiujn malsanulejojn de Ĝenevo al Valezo. Antaŭ unu semajno li decidis kontakti la hospitalojn de Francio sur la alia flanko de la lago. En Evian iu parolis al li pri junulo, kiu perdis la memoron kaj loĝas nun en kliniko. Ŝajnas, ke antaŭ tri monatoj la laga polico kondukis lin preskaŭ senkonscie tien. Li ne plu rememoras sian nomon kaj preskaŭ ne parolas. Dieter pretekstis ion kredindan por iri viziti lin. Li revenis tute perturbita kaj demandis al mi, kion fari?»*





EN AMBAŬ DIREKTOJ:
1 – Tuto de skribaj verkoj. 2 – Kompleksa kaj nereala (mat). 3 – Ero de fum-materialo. 4 – Unuformigo. 5 – Orienta du-rada veturilo tirata de viro. 6 – Membrego. 7 – Pezo de pakmaterialo. 8 – Formortinta bovo. 9 – Kemia simbolo de radiumo. 10 – Vokalo.







EN AMBAŬ DIREKTOJ:
1 – Libroforma listo de aĉeteblaj objektoj. 2 – Seksa amado. 3 – Speco de hakilo. 4 – Delikata odoro. 5 – Granda speco de mevo. 6 – Lirika poemo. 7 – Japana ludo. 8 – Mallongigo por omo.





## Intervjuo de Claude Blanc , fidela membro de LES.

(Fare de Francisko)



*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi naskiĝis la 14an de februaro 1947 en la akuŝejo de Laŭzano. Kiel infano, mi vivis en Renens ĉe mia patrina avo, ĉar mia panjo devis labori la tutan tagon. Mi ege ŝatis bicikli. Kiam mi 14jaraĝis, revenante de aĉetejo, mi haltis ĉe la trafiklumoj, kiam motorciklisto fortege akcidentigis min. Mi restis du monatojn en la komato. Post longa reedukado, mi iris al Friburgo en *Metilernada Centro* kaj restis tie ses monatojn; estis malfacile longtempe sinkoncentri. Revenante en Renens mi laboretis por presisto portante librojn.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**En la presejo mi konatiĝis kun kolego, kiu nomiĝis Bertrand Pilloud. Li parolis al mi pri esperanto kaj instruís al mi la diversajn bazojn de la lingvo.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Tuj Bertrand proponis al mi partopreni la kunsidojn de la asocio de Laŭzano en la *Popoldomo* de Chauderon. Tie mi konatiĝis kun David Buhlmann.**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Ĉiuj mokis min pri mia ideo studi esperanton; mia patrino eĉ ne komprenis. Mi loĝis ĉe ŝi ĝis la momento de ŝia morto antaŭ kvin jaroj, kiam ŝi 90jaraĝis.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Mi vivas nun en Institucio kaj mia kuzino estas mia kuratoro. Mi nur konas membrojn de LES.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Mi bonŝance partoprenis tri Universalajn Kongresojn: Brajtono 89, Montpeliero 98 kaj Roterdamo 08.**